

Reinhard Arfsten,  
Somera nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Somera nokta trankvilo sen vent',  
Profunda pac' ĉirkau mi.  
Jam ardas stri' en la orient',  
Preĝeja solen' ĉie ĉi.  
Ne blekas bovo, ne vokas vanel',  
La kampoj spiras en la malhel',  
Engrese pepas alaŭdo nur.  
Je tiu ĉi frumatena horo  
mallaŭte iras la Di-Sinjoro,  
tra la kvieta natur'.

*Traduko de la Frisa poemo "Somernaacht" de REINHARD ARFSTEN (\*1897 – †1971) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2000-07-29.*

*Arg-34-63 (2004-03-10 21:45:55)*

*Tiu ĉi poemo de la frisa poeto Reinhard Arfsten troviĝas presita en la libro „Fering lidj an leewent“, volumo 1, kiu enhavas tri rakontojn de la frisa aŭtoro Peter Paulsen. La eldoninto estas profesoro d-ro Nils Århammar, la eldonejo: Nordfriisk Instituut, D-25821 Bräist/Bredstedt, Germanio. La libro aperis en 1993 je la centa datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro. ISBN 3-88007-210-8. Profesoro Nils Århammar donis al mi, Manfred Retzlaff, pere de s-ino Adeline Petersen, kiu estas kunlaborantino de la Nordfrisa Instituto, la permeson de publikigo de la poemo en tiu ĉi mia interreta datumbazo.*